

Konstruado- kajero 2017

Nº2

jara revuo de TAKE

Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
Wintzenheim Francio

Eldonis: Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE)
83-Rue de Tiefenbach, 68920 Wintzenheim, Francio.

Redaktis: Pierre Grollemund.

Enpaĝigis: André Grossmann

La fotoj sur la kovrilpaĝo estas prenitaj de artikoloj el ĉi-tiu
KONSTRUADO-kajero

Okaze de la IFEF kongreso 2017, la teamo de TAKE dediĉas specialan numeron al fervojaj vorkoj. La temo plej traktita estos stacidomoj, kiuj koncernas ambaŭ profesiajn mediojn, la fervojistan kaj la konstruistan.

Ni dankas ĉiujn personojn, kiuj bonvolis helpi nin en nia serĉado de dokumentoj kaj bedaŭras, ke ni ne povas citi ĉiujn!

© Kopirajto ĉe la aŭtoroj de la respektivaj tekstoj kaj bildoj.

Enhavo

N ^o	Titolo	Aŭtoro	Paĝo
1	Enkonduko	La redaktinto	4
2	La nova tunelo de Sankta Gotardo en Svisio	Pierre Grollemund (FR)	5
3	Rekontruita stacidomo Ŝinĉi post la cunamo de 2011 en Japanio	HORI Jasuo (Japanio)	12
4	La stacidomo de Colmar , historia respegulo.	Pierre Grollemund (FR)	16
5	Arkitekturaj juveloj: la polaj stacidomoj de Gdansk kaj Wroclaw	Pierre Grollemund (FR)	25
6	La stacidomo de Zagreb kaj ties trafiko	Zlatko Hinšt (Hr)	28
7	La nova stacidomo de Vieno	Walter Klag (Aŭstrio)	38
8	La stacidomo de Stuttgart	Manfred Westermayer (DE)	42
9	La 5 stacidomoj de Saint-Etienne	Pierre Grollemund (FR)	48
10	La stacidomo de Perpignan	Salvador Dali!	57
11	Fervojaj stacidomoj en Ĉilio	Henrique Fernandez	60
12	La kastelo Grezijono	Pierre Grollemund (FR)	66

Enkonduko: **Fervojoj kaj konstruado**

La ekzemplo de la konstruado de fervojaj tuneloj

De kelkaj jaroj ŝajnas, ke larĝa publiko montras malintereson por la fervoja transporto. Iuj argumentas, ke nuntempe vojaĝojn long-distancajn eblas fari rapide kaj efike, precipe per aviadilo, ke la survojoj transport-rimedo draste konkurencas la fervojajn: busoj long-distancaj, aŭtomobiloj ĉiuspecaj (inkluzive tut-terenaj). Ili havas la impreson, neniam uzante trajnojn, ke la fervojaj transporto-rimedoj supervivas nun post glora pasinteco.

Kion respondi al tio? Nu, plej simple montrante ekzemplojn de investoj de Ŝtatoj aŭ regionoj dise en la mondo: Investi per gigantaj sumoj neniam estas decidite sen longa pripenso kaj rendimento-kalkuloj! **Investi estas konstrui l'estontecon!**

Japanio konstruis en 1988 la **tunelon de Seikan**, 53,850 km longan, kiu restis la plej longa en la mondo de 1988 ĝis 2016. Ĝi respondis al vera bezono, en lando de insuloj kaj montaroj!

Iom poste, en 1994, okazis la konstruado de la fervoja **tunelo** sub la **Manika Markolo** inter Britio kaj Francio, (50,450 km) kiu ĝuas grandan komercan sukceson, kaj en la pasintaj jaro (junio 2016) estis inaŭgurita la tunelo la plej longa de la mondo inter Svisio kaj Italio: la **Tunelo de Sankta Gothard** (57,104 km!)

Ni ne povas citi ĉiujn fervojajn tunelojn, ekzemple 3 pliajn en Japanio, sed ankaŭ en Ĉinio (almenaŭ 8!) En Usono, la Federacia Ŝtato ekkonscias pri la graveco de fervojaj linioj kaj decidis modernigi ilin, post longtempa forlaso. Ĉinio siaflanke malfermis la plej longan fervojan linion de Pekino al Eŭropo.

Kion pruvas tio? Tutsimple, ke l'estonto de la fervoja transporto restas pozitiva, ĉu por vojaĝontoj, ĉu por transporti varojn al fora celo. Evidentas substreki, ke tiuj investoj konsistas ofte el konstru-agadoj, en kiuj estas implikitaj multaj entreprenoj kaj **profesiuloj de konstruado**.

Tial, la teamo de TAKE ĝojas partopreni la organizadon de la IFEF-kongreso 2017 en Colmar kaj decidis eldoni specialan numeron de sia revuo "KONSTRUADO"